

4-5. PRINTEMPO/SOMERO 2007 – 4-5. SPRING/SUMMER 2007

www.jeb.org.uk/forumoj




Kampardoma Renkontiĝo Madrid

9-11 marto 2007 Hispanio

Raportas Lauren Barnes

Mi ekaŭdis pri Esperanto per amiko de universitato kaj poste aliĝis al JEB. Li donis al mi la libron *Winnie-la-Pu*, kiun mi trovis tre ĉarma. La antaŭskribo estas en la angla kaj ĝi enhavas vortaron, kiun mi povis uzi por serĉi novajn vortojn dum mi legis la rakonton. Mi ĵus ekfaris la senpagan kurson kiam mi aŭdis pri la [kampardoman renkontiĝon](#) en Madrido. Mi tuj jesis kaj decidis partpreni por plibonigi mian Esperanton.

Ni forveturis el Liverpool kaj iom parolis [e-on](#) dum la flugo por praktiki. La vojaĝo el la flughaveno estis facila sed [longdaŭra](#). Ni fine alvenis dum la vespero sed kiam ni [proksimiĝis](#) al la gastejo, mi komencis zorgi pri kiaj estus la Esperantistoj kaj ĉu mi povus sufiĉe bone komuniki.



Ni volis manĝi kaj ni estis lacaj. Unue ni trovis nian ĉambron kaj tiam iris al manĝejo. Mi ne feliĉis ĉar mi estas vegetaranino kaj ĉiu la manĝaĵo enhavis viandon, eĉ la legumoj. Nokte, mi estis malsata sed ni renkontis novajn amikojn kaj ili estis tre afablaj.

Poste, la grupo kune rigardis kelkajn filmojn mallongajn en Esperanto. Ili estis tre interesaj kaj

amuzaj, por tiuj, kiuj komprenis ilin. Ni ne volis jam dormi do iris al la centro de Madrido por danci kaj trinki [Sangrion](#).

La sekvan tagon, mi iris al kelkaj kursoj por komencantoj. [Proksimume](#) 50 Esperantistoj partoprenis en la taskoj, kiuj estis tre helpigaj.


Mi ŝatas Madridon. Ĝi estas tre bela urbo. Mi amikiĝis kun pluraj aliaj Esperantistojn kaj kelkaj homoj de Madrido. Mi ne volis reiri hejmen.

Mi ŝatus daŭrigi mian lernadon de Esperanto. Mi ŝatas ĝin ĉar estas bonega okazo por popoloj trans la mondo komuniki egale per neŭtrala lingvo. Mi parolas ankoraŭ kun miaj amikoj de Hispanio kaj mi praktikas kiam mi havas la okazaĵon.



Internacia Junulara Festivalo Lignano Sabbiadoro, Italio 5-10 aprilo 2007

Raportas Daniel White



Ĉe Esperanto-aranĝoj eksterlande, ĉiam la plej malfacila tasko estas kompreni la lokan lingvon por atingi la kongresejon. La vojaĝo ne estis tro zorgiga kaj mi malkovris ke mi sufiĉe komprenis la italan por ne tro perdiĝi.

Alveninte, mi vidis multajn konatojn. La italoj kaj la katalunoj estis kompreneble bonaj kunamuzuloj kaj ankaŭ ĉeestis la prezidantino de la IJK en Bosnio, tre lerta. Preskaŭ tuj, amiko de iu, kiu ĉeestis la IS-on petis ke mi rerakontu la rakontojn de la furioza drako kaj tiun de malpura Sanchez, kun la agoj, kompreneble!

La IJF lasi min iom repozi kaj estis pli malstreĉiga ol en Madrido, kie mi devis prizorgi komencanton; pri ĉu ŝi komprenas, kio okazas; ĉu ŝi amuzas, ktp. Mi havis la eblecon iri al Venizo dum kelkaj horoj kun unu-du aliaj kongresanoj. Tre bela urbo, bonega vetero, sed vidi unu ponton estas vidi ĉiujn.

La manĝaĵo en Italio estas rimarkinde pli bona ol kutime, kun kaj pico kaj pastaĵo por ĉiu manĝo; nur la italoj mem plendemus. Nokte, la georganizantoj dure laboris por oferi muzikon kaj sufiĉe da alkoholaĵoj, kiuj estis malpermesitaj en la elektita kongresejo. Mia tiama ekpenso estis ke Esperanto-aranĝoj vere estas tion, kion vi igas ilin. Se volas amuziĝi, vi

mem devas krei la etoson. La etoso ĉe la IJF, por mi, estis pli bona ol ĉe kelkaj aliaj eventoj en kiuj mi partoprenis.

Esperantumi ĉe la marbordo dum Pasko

kun multe da sunbrilo estas aparte bona sperto.


ekaŭdis, first heard; kampardoma renkontiĝo, country house meet-up; e-o, Esperanto; longdaŭra, took a long time; proksimiĝi, get near to; proksimume, approximately; atingi, reach; zorgiga, worrying; konatoj, people you know lerta, 'on the ball'; pasko, Easter; antaŭmendi, pre-order; laŭe, accordingly; luktarto, martial art



Brita Kongreso de Esperanto Letchworth 4-7 majo 2007

Ekde la komenco, la JEB organizado fuŝis. La ĉambroj antaŭmenditaj estis super hinda restoracio. Kaj tiam ni malkovris ke ial la ejestro donis al ni nur ĉambrojn kun duoblaj litoj. Kaj tiam ni vidis la ĉambrojn mem...

... kaj tuj eliris trinkejen!



La fama Esperanto-kantisto JoMo ludis en la centro de la urbo kun amaso de lokaj spektantoj. Li klopodis rompi sian propran mond-rekordon Guinness kaj kanti 25 kantojn en 25 malsamaj lingvoj.

Multaj junuloj ĉeestis la kongreson kaj laŭe oni multe festis. Rolf prelegis pri la renoviĝo de la monda movado kaj Tim helpis kun la prelego de Klarita Velikova pri korea luktarto.



Danny kun dancistino Annice Szrejbman

Basic Esperanto Reminders



Hundo o dog
Rapida a quick
Rapide quickly

Mi estas I am
Mi estis I was
Mi estos I will be
Mi estus I would be
Estu bona! Be good!
Esti To be

N Accusative
La hundo amas la katon

J Plural
Pomoi estas fruktoi

En la trinkejo, Olly kaj Hannah ĝojas ricevi la gazeton S@luton..
...eĉ se nur unu scipovas legi ĝin





Supre: Pra-sekretario de JEB,
Paul Roberts kun lia frato Neil



Marcos Cramer de Germanio, redaktisto de *TEJO-tutmonde* kaj Marteno 'Ĥaluŝkoj' Minich eks-volontulo por TEJO debatas gravajn grakatikajn aferojn.



Maldekstre: Michael Seaton, Olly Holmes, Paul Williams kaj Hannah Tellier (ĵus antaŭ ol ŝi estis atakita per litinsektoj en tiu aĉa gastejo..)



Rolf Fantom kaj Lucie Cavoizy
Mi ne scias kial li tiom feliĉas sed ŝi ŝajne ŝatas...



Gerda Malaperis Esperanto film on DVD

A friend lent us a copy of the DVD, recently produced in Brazil, which we enjoyed. I contacted the production team, in Brazil, and, as a result of a slight misunderstanding - no doubt resulting from my lack of expertise in the language - I received a parcel of Gerda DVDs, to sell in England! I could have sent them back, but I've decided to go ahead, as the producers at 'Imagu' are a lovely lot and I do think the film is worth promoting. Short of opportunities to converse in Esperanto, we find the film is an excellent way to improve picking up spoken language, whether or not you are following the course. We have a copy of the book, (which I'm happy to lend), but the film has English subtitles - which means you can even enjoy it with your non-Esperanto speaking friends!!

Those of you who've been following EAB's 'Elementary' course or read the book will know the flirtation between Tom and Linda is immensely cheesy, however, incredibly the actors pull it off and the banter between the two main characters is a pleasure. The Brazilians clearly have something to teach us in the school of charm, although it does

not necessarily come easily to everyone. There is another Tom, in the Outtake section, who doesn't have quite the same knack with the ladies, but is entertaining for that very reason.

There are parts which could be skipped, an overlong scene of Gerda crying and another of her in the dark with Bob, where all you can see is the occasional glint of his glasses, and a flash of his teeth, to indicate how smitten he is. However, most of the film is great fun to watch and looks very professional. The maniacal nurse is another gem. The speed at which your brain is unable to unravel spoken Esperanto will improve in leaps and bounds. Even if I wasn't trying to sell it to you, I'd say it is well worth having a copy, whether or not you are following the course.

I don't think there is anywhere else in the U.K. that you can buy the DVD for less than £17.75, inc. P&P, and I'm offering it for **only £9.99 + £1 P&P**

Rachel Bridgeland
Rachel@bridgeland.co.uk
Tel: 01983 872997



Litinsektoj, bed bugs; kapabloj, abilities; malstreĉiĝi, relax; tutaĵo, whole; jama, current; feliĉeco, happiness



JoMo kaj S-ro Fantom
malstreĉiĝas

Timo-san, la karateo knabo

Tim Owen montris al ni, siajn luktartajn kapablojn dum prelego en la halo de Letchworth.



Olly kun novulo Paul Willams

Paul ĉeestis sian unuan Esperanto-aranĝon en Letchworth



Clare Hunter

Pro familiaj kialoj mi bedaŭrinde ne povis ĉeesti la kongreson. Mi tamen kredas ke mi estas la plej bone informita membro de JEB! Kiel tio eblas? ĉar kaj dum kaj post la semajnfino, mi babilis

al ĉiuj rete, kaj tiel aŭdis almenaŭ ses malsamajn versiojn de la okazaĵoj :) En la JEB forumoj oni ja nomas min Radio pro mia emo dissendi informaĵojn tra la tutaĵo de JEB!

Dankon al ĉiuj niaj patronoj jamaj kaj novaj!



Annual General Meeting 2007

- An Agreement with EAB will be drawn up to make JEB its official youth section.
- Lower age limits will be removed
- JEB will arrange its own weekend events

New committee 07/08

Tim Owen – President
Daniel White – Secretary
Michael Seaton – Treasurer
Clare Hunter
Hannah Tellier
Rolf Fantom
Petra Fantom

- A new bank account has been opened.

La komitato diskutas JEB-aferojn, plene de entuziasmo kaj feliĉeco..



Kiun Lingvon oni parolas en Danio? Rakontas Clare Hunter

Verŝajne tio ŝajnas stulta demando. Eĉ al nur duoncerba homo la respondo devas esti klara. Antaŭ kelkaj monatoj mi tion mi pensis.

Mi havas la bedaŭrindan sorton esti kontisto; profesio kiu ofte vojaĝigas min al la industriaj regionoj de Britio. La ŝokigaj eventoj, kiujn mi rakontos, komenciĝis en senfenestra ĉambro en Oksforda fabriko, kie dum tri semajnojn sidis mi kaj du kolegoj por kontroli la fabrikajn kontojn.

En nia teamo estis mia bonkora mastrino, kiu havas dudek sep jarojn kaj universitatan edukon; dekokjaraĝa knabino, tre lerta kaj diligenta; kaj mi. Nia kliento ĵus aĉetis novan filion en Danio, kaj estis nia laboro kontroli la Danajn numerojn.

Al mia kunlaboranto la kliento donis enorman datenbazon rilate al la varoj produktitaj en la Dana fabriko. Ŝi komencis ĝin legi, sed baldaŭ, kun visaĝo perpleksa, ŝi diris al mi, "Mi ne povas kompreni tiun ĉi, ĉar ĝi ne estas skribita Angle! Kiun lingvon oni parolas en Danio? La nederlandan, ĉu ne?"

Antaŭ ol mi povis eĉ malfermi mian buŝon, mia mastro respondis. "Kiun lingvon oni parolas en Danio? Jes, certe estas la Nederlanda!"

Pro tio mi estis iomete ŝokita. Mi ja interesiĝas pri lingvoj kaj tiaj miskomprenoj ege ĝenas min. Mi do klarigis ke en Danio oni kutime parolas la Danan (Danish), kaj la Nederlanda (Dutch) fakte estas parolata en Nederlando.

"Vi malpravas," venis la tuja repliko de mia mastro. "Ĉu mi povas vidi la dokumenton?" mi demandis ĝentile. "Mi iomete komprenas la Nederlandan ĉar ĝi ege similas al la Germana."

Rigardinte la datumbazon, mi baldaŭ tutcertis ke ĝi estas skribita Dane kaj tion mi multfoje ripetis. Dum tridek minutojn ni disputis la aferon, kaj je la fino mi ne gajnis.

Reveninte al mia hotelo tiun vesperon, mi ankoraŭ pripensis la okazaĵon kape. Mi scivolis, ĉu miaj kolegoj estas aparte malbone informitaj, aŭ ĉu ĉi tiu manko de scio estas kutima tra la tuta Brita popolo.

Parolante al mia eks-koramiko telefone, mi decidis ankaŭ lin demandi, kiun lingvon oni parolas en Danlando. Li estas inteligenta viro, kaj nuntempe laboras ĉe unu el la plej grandaj firmaoj de kontistoj en la mondo. Li sciis la diferencon inter la Dana kaj la Nederlanda, ĉu ne? Post kiam mi lin demandis, estis paŭzo. Li respondis

heziteme, "En Danlando? La Nederlandan, mi kredas." Diri ke mi estas desapontita estus maltrigo.

"Do, kiun lingvo oni parolas en Nederlando??" La respondo laŭ mia eks-koramiko: "Hollandaise"! "Hollandaise", mi ripetis konfuzite. "Tiu ne estas speco de saŭco, ĉu ne?"

Rapide perdante la volon vivi, mi tamen igis min eltrovi la etendon de la problemo. La sekvan tagon, parolante al bona amiko Matt, mi decidis kontroli ankaŭ lian scion de mondaj lingvoj.

"Matt," mi diris hezitante, "laŭ vi, kiun lingvon oni parolas en Danlando?" Matt pripensis la aferon zorgeme.

"La Norvegan", li finfine respondis.

"La Norvegan?!" mi ripetis, perplekse. "Ĉu vi certas ke oni ne parolas la Danan, aŭ eĉ la Nederlandan?"

"Jes, certe estas la Norvega," ridetis Matt memfide.

Mi spertis nekutiman emon bati mian kapon kontraŭ muro.

"Sed ... sed kiun lingvon parolas la Norvegoj, se ne la Norvegan?"

"La Vikingan."

"La Vikingan?!!!" Mi preskaŭ perdis la kapablon paroli. "Matt, tiu ne estas vera lingvo," mi finfine klarigis malforte.

"La Vikinga ja estas lingvo," kontraŭis Matt. "Pri tiu oni instruis min en la bazlernejo."


Je ĉi tiu punkto mi decidis ke la vivo ne plu indas kaj mi enlitiĝis, plorante.

Eĉ kvar monatoj poste, mi ankoraŭ miras kiam mi memoras la sencion de miaj konatoj. Ili estas ĉiuj inteligentaj, bone edukitaj, profesiaj homoj, kiuj fakte jam vojaĝis al pli da diversaj landoj ol mi. Kial ili do ne scias ion tiom fundamenta kiel la precipa lingvo de aliaj Eŭropaj landoj? Ĉu ne estas la privata respondeco de ĉiu homo mem certigi ke li estas sufiĉe bone informita pri la mondo, en kiu li loĝas? Ŝajnas

kvazaŭ al kelkaj Britoj bedaŭrinde ne kapablus zorgi malpli pri kiujn lingvojn oni parolas en la restaĵo de Eŭropo. Tiu evidentiĝis dum babilado kun mia eks-koramiko, kiu finfine demandis min, "Ĉiuokaze, kial gravas, kiun lingvon oni parolas kie? Mi certas, ke kaj en Danlando kaj en Nederlando la popoloj flue parolas la Anglan!"



kontisto, accountant; ŝokiga, shocking; fabriko, factory; filio, branch; varoj, merchandise; tuja, instant; Li sciis la diferencon, he should know the difference; maltrigo, understatement; evidenta, obvious



Tiu, Kiu Ridas Laste... Vocabulary notes by Tim Owen

In 1972, Fred Parker published "Rakontoj el pluraj landoj" (Tales from several countries), a collection of short stories that he had heard on his travels. According to the foreword of his book, he felt the lack of appropriate reading material had long been a problem for learners of Esperanto. "Rakontoj el pluraj landoj" were written to fill the gap.

Kaporalo Patrick Doyle iris al la kolonelo de la regimento, kaj **petis forpermeson** por du semajnoj. La kolonelo estis severa homo kiu tre malofte donis privilegiojn al la soldatoj, kaj ĉiam evitis tion fari kiam eble.

"Nu," diris la kolonelo, "kial vi petas du semajnojn for?" Pat respondis, "Mia edzino estas malsana kaj la infanoj ne estas bonsanaj, kaj bonvolu, sinjoro, ŝi volas havi min hejme, por ke mi helpu ŝin **prizorgi** la infanojn."

La kolonelo dum momento serĉe rigardis lin kaj tiam diris, "Kaporalo, placus al mi konsenti pri via peto, sed

hodiaŭ matene mi ricevis de via edzino leteron en kiu ŝi diras, ke ŝi ne deziras, ke vi iru hejmen. Efektive ŝi petegas min ne doni al vi alian forpermeson."

"Tio decidigas ĝin do," diris Pat. "Ĉu ne estas espero?"

"Mi timas, ke ne. Estus maldece **miaflanke** doni al vi vian peton laŭ la cirkonstancoj."

Estis nun la **vico** de Pat serĉe rigardi la kolonelon. Tiam li marŝis al la pordo sed subite haltis kaj diris, "Kolonelo, ĉu vi bonvolos permesi al mi diri ion al vi?"

"Certe. Kio ĝi estas?" diris la kolonelo.

"Kaj vi ne koleriĝos, se mi diros ĝin?"

"Certe ne, kio ĝi estas?"

"Mi nur volas diri, ke en ĉi tiu ĉambro," diris Pat, "estas du belaj **mensogistoj**, kaj mi estas unu. Mi neniam havis edzinon en mia tuta vivo."

-
- **Peti**: to ask or request something, but is not the same as **demandi**, which would seek some information or similar. **Demandi** is exclusively asking a question, whereas **peti** is to request a service or something along those lines; **peti** bieron = *to ask for a beer*, for example.
 - **Forpermeso**: **Permiso** = permission. **For** = away. The literal translation of **forpermeson** is 'away permission', which means he requested leave from duty.
 - **Prizorgi**: "Bona patrino **zorgas pri** siaj infanoj. Ŝi **prizorgas** ilin." **Zorgi pri** io = **Prizorgi** ion = *to look after or take care of someone or something*.
 - **Miaflanke**: **Flanko** is a side of something, be it somebody's body, a ten-pound note, and so forth. The author is using **miaflanke** to mean *on my side*, which we should read as 'on my part'.
 - **Vico**: a line of something arranged in an order. In most cases, one would translate it as *queue*. In this particular case, we'd use *turn*; the thinking is in queueing for something, one waits until it is one's turn to, for example, get on the bus, pay the cashier, or ask the question, so it's still quite consistent here. It was *Pat's turn* to give the other man a searching look.
 - **Mensogisto**: "Kiam oni **mensogas**, oni ne parolas la veron." **Mensogi** is *to (tell a) lie*.

Contribute to your Saluton!

Contact JEB in the forums if you have comments, articles or photos.

**Somera Kunveno 2007
21-22 July, Stratford-upon-Avon**

The informal weekend arranged by JEB was a success, despite flooding in the Midlands. A good chance for members to get together for a couple of drinks and a laugh.

The

Language Show



2nd - 4th November 2007 Olympia London

JEB has an information stall with Esperanto-Asocio de Britio at the London Language Show.

Entry is free. The exhibition is on for three days.

Friday 2nd November 10am – 6pm

Saturday 3rd November 10am – 6pm

Sunday 4th November 10am – 5pm

Free taster lesson for Esperanto - Friday 17.15

Get your tickets when you register

www.thelanguageshow.co.uk for all details

Internacia Seminario

Würzburg, Germany
27 Dec 2007 – 3 Jan 2008

The biggest Esperanto New Year's party has taken over a castle in Bavaria. Over 200 people are expected, with places going fast.

The IS is well known for its chilled out atmosphere and full on partying. As well as all the nightly entertainment, a serious program is also on offer, giving this event something for everyone, whether you're new to the world of Esperanto, or have come to meet old friends.



For online sign-up and full information

<http://ttd.esperanto.de>

Get Your Esperanto Trips subsidised by NoJEF!

Norwich Jubilee Esperanto Foundation is a charity that is keen to help fund Esperantists aged 25 or under to travel to Esperanto events and courses anywhere in the world.

To apply for a grant to cover all or part of your travel costs, all you have to do is fill in a **Application Form**, preferably the one in Esperanto, and send it with a short cover letter in Esperanto to: David Kelso, 5 Craigenhill Road, Kilncadzow, Carluke, ML8 4QT

Or email the necessary information with your letter to davidekelso@yahoo.co.uk

If possible try to apply around 3 months before the date of the event you are going to attend.

<http://esperanto-gb.org/nojef>